# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:36; septembro 30.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: sen. Sume 300 KB

## Virtuale kongresu!

La 5-a Virtuala Kongreso de Esperanto (**VK**) okazos de la 28-a de novembro ĝis la 1-a de decembro 2024! Jam eblas aliĝi al ĝi: vk.esperanto.net/2024. Ĉiuj individuaj membroj (IM) de UEA povas senpage aliĝi – tamen aliĝo senpagas por IM nur ĝis la 13-a de novembro 2024! Se vi ankoraŭ ne estas IM de UEA, eblas samtempe membriĝi al UEA kaj aliĝi al la VK ĉe vk.esperanto.net/2024/aliĝilo. Alternative eblas unue aliĝi rekte ĉe UEA, kie eblas elekti aliajn aliĝ- kaj donac-opciojn uea.org/alighoj/alighilo. Donacoj ĉiam bonvenas: eblas donaci dum aliĝo (eĉ se senpage aliĝante) aŭ aparte, per speciala konstanta fonduso de UEA por la VK: uea.org/alighoj/donacoj/vk. Donacoj al la VK helpas kovri la kostojn de la evento kaj ebligas senpage partoprenigi nepagipovajn homojn, kun speciala atento al junuloj, virinoj kaj pensiuloj. Ĉiuj, kiuj donacas ekde € 50, aperos (se konsente) kiel **Subtenanto de VK** sur la Listo de aliĝintoj de la 5-a VK.

Laŭ Gazetara Komuniko de UEA.

## Enhavo de la pedagogia revuo de ILEI, numero 2024-3

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) p.3
Aristóphio A. ALVES FILHO: Raporto pri la 57-a ILEI-Kongreso p.4
Ariadna GARCÍA GUTIÉRREZ: Esperantaj radioelsendoj kiel efikaj lerniloj p.13
Manĝetiketa Seminario (Alessandra MADELLA) p.14
Mireille GROSJEAN: UK 2024 Arusha Malfermo - Salutparolo nome de ILEI p.15
*La Tago de Lernado* / Komitatkunsido de UEA (Marija BELOŜEVIĈ) p.16
Ilona KOUTNY: Unika eksperimento finiĝas per bonaj rezultoj en AMU p.20
Ladislau AFONSO: La apo *LearningApps* por Esperantaj didaktikaj ludoj p.23
El la landoj kaj sekcioj (CN, BI, FR, RS, TZ) p.28
AMO-seminario ĝis la fino de 2024 (Stefan MACGILL) p.34
Sur la titolpaĝo: Patrick Manirakiza, nia nova estrarano, prelegas en La Tago de Lernado dum UK. (vd. p. 16)
Dorskovrile: Unika eksperimento finiĝas per bonaj rezultoj en AMU (vd. p. 20)

## UEA aktiva ĉe UN

Aperis la septembra-oktobra numero de nia informilo, en tri versioj: Esperanto, la angla kaj franca. Enestas raportoj pri la UK en Aruŝo, indiĝenaj lingvaj rajtoj, Eo-konferencoj en Afriko kaj Azio kaj la Eo-Tago en julio.

Esperanto: https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2024/09/Informilo72-2409-.pdf
Angla: https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2024/09/Newsletter72Sep2024.pdf
Franca: https://esperantoporun.org/wp-content/uploads/2024/09/Lettre72sept24.pdf

## Kursoj en Slovenio kaj Francio

La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo: Université de Tours
Gvidantonomo kaj aldoninto: Philippe PLANCHON
Tipo: Nova universitata kurso
Loko: Tours, Francio.
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27656
======
Nomo: Kurso de Esperanto
Gvidantonomo: Peter Grbec, Aldoninto: peterg
Loko: Izola, Slovenio
Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27657

## La demonstra ondo

Aperis la demonstra versio de la junia (somera) eldono de la trimonata bitgazeto *La Ondo de Esperanto*. La 35-paĝa demo-versio (PDF) enhavas plurajn tekstojn kaj tekstokomencojn el la riĉenhava 136-paĝa 320-a eldono de *La Ondo de Esperanto,* dissendita al la abonantoj antaŭ pli ol du monatoj. Legu la demoversion kaj decidu pri (re)abono por 2024
https://sezonoj.ru/2024/09/ondo-131/
bonvolu kontroli en https://uea.org/vikio/Kategorio:ETOSO

## Pollando vokas

En la kulturkronika bulteno ni informas pri la okazanta en Varsovio 20-a Festivalo *Kruĉiĝo de Kulturoj* kun partopreno de artistoj el Suda Koreio, Insularo de la Verda Kabo, Alĝerio, Malio, Angolo kaj Italio; *Pola-Rumana Kultura Sezon*o kun eventoj en ambaŭ landoj, kiu daŭras ĝis oktobro.

## Marjorie Boulton en la memoro



En la 7-a mortodatreveno de la plej elstara Eo-poetino, Marjorie Boulton (pasinta aŭguste) el la arkivo de la Eo-Redakcio de Pola Radio ni memorigas nian intervjuon faritan kun ŝi dum la UK en Vilno 2005. En la kulturkronika bulteno ni informas pri la 50-jariĝo de la Arkady Fiedler-muzeo apud Poznano, pri la arto de Hiroshige en Krakovo kaj pri regionaj kulturdistingoj en Lublino (la orienta Pollando);

- Ni krome informas pri la proksimiĝanta IKUE-kongreso kaj konkurso ligita kun ĝia temo: https://mallonge.net/75ikue;
- En unuopaj rubrikoj de nia paĝo eblas konsulti la paralele legeblajn kaj aŭdeblajn tekstojn el niaj elsendoj, kio estas tradicio de nia Redakcio ekde 2003.

## La pioniraj gazetoj, kiuj savis nian lingvon de pereo

Antaŭ 135 jaroj, la 1-an de septembro 1889, en Nurenbergo aperis la unua numero de la unua Esperanta gazeto *La Esperantisto*. Legu la liston de la Esperantaj jubileoj kaj memordatoj en septembro 2024, kompilitan de Aleksander Korĵenkov, en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/septembro-12/

***SMG:*** Kiam en Pollando Eo-revuoj estis malpermesitaj, transprenis la torĉon alilandaj revuoj, nome tiun en Nurenburga kaj unu en Svedio. Danke al tio movado kreskis tra okcident-eŭropaj landoj.kaj eble savis la lingvon!

## Kondolenco al s-ro Moriŭaki Jasumasa

S-ro Moriŭaki subite forpasis la 5-an de aŭgusto, la duan tagon de la 109-a Universala Kongreso en Aruŝo en Tanzanio. Unu jaron antaŭe li fariĝis rulseĝulo, sed li neniam perdis kuraĝon partopreni en Esperanto-kunvenoj. Post la UK en Tanzanio li planis vojaĝi eĉ al Madagaskaro por renkonti esperantistajn amikojn.

Mi plej laste renkontis lin komence de junio dum la Kjuuŝuu-Kongreso kaj ni kune vizitis la kastelon Kumamoto. Li estis diligenta partoprenanto en la Internacia Esperanto-Sumoo. Li estis motoro de la movado en la regiono Kjuŝu.

HORI Jasuo

## Universitata kunpensado

Ni aŭskultis raporton de Probal Dasgupta kaj Sajal Dey pri la instruado de Esperanto en prestiĝa nord-barata universitato. Krom tio ni aŭdis pri la sukceso de la kunveno pri konstruitaj lingvoj en Francio de Philippe Planchon kaj pri la ekzameno kaj diplomoj al la kursanoj de la universitato en Teherano. pro teĥnikaj problemoj Dennis Keefe povis nur raporti skribe pri kelkaj problemoj en la anoncado de la kursoj ĉe la universitato UNED en Hispanio.

## Balkane, plu elane, Danube sendube

Ĉeestis esperantistoj en Albanio, Bosnio, Hungario, Italio/Britio, Rumanio kaj Serbio.. Oni diskutis pri laaŭgusta kongreso en Beogrado, kies organizado progresis regule pri ĉiuj ĝiaj apartaj subkunvenoj. Interalie estis kontaktoj kun  la Ministerio pri Edukado, kiu promesis ĉeesti la inaŭguron kaj prelegi en ĝi. Diskutite estis la situacio de Esperanto en Bosnio, la propono pri la organizado de la Panonaj Tagoj en postaj jaroj kaj la komuniko de la Ministrio pri Edukado pri tio, ke la unuopaj lernejoj rajtas memstare decidi pri akcepto de proponoj pri prelegoj aŭ kursoj de Esperanto

Gvidis la kunvenon Radojica Petroviĉ. Protokolis Renato Corsetti

## Esperanto samrajta

Laŭ informo de Etsuo Miyoshi la departemento “Lernejoj kaj Multlingveco” de la Eŭropa Komisiono konfirmis, ke Esperanto estas samrajta kun aliaj lingvoj por la projektoj de Erasmus+ kaj Kreema Eŭropo. Legu pli en *La Ondo de Esperanto* ĉe https://sezonoj.ru/2024/09/europo-6/

***SMG:*** Jen la ĉiama subskribo de *Ondo*:
**Ni estas kontraŭ milito, ni estas por paco!** La retejo por vi: https://sezonoj.ru/

## Kursoj per la rusa kaj Esperanto

Ekde la 12-a de oktobro ekas du Eo-kursoj per Zoom (la baza A1, A2, B1 — surbaze de la rusa lingvo kaj la mezgrada B2, C1 — plene en Esperanto). Dezirantoj partopreni iun el la kursoj bv. peti pliajn informojn ĉe esperanto-kurso@mail.ru

========= vortoj: 1074 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

**Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj**

**Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj**

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj.  Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn, kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.